

Posner MI, Boies S, Eichelman WH & Taylor RL (1969). Retention of visual and name codes of single letters. *Journal of Experimental Psychology*, 79, 1-16.

Posner MI & Keele SW (1967). Decay of visual information from a single letter. *Science*, 158, 137-139.

Posner MI & Mitchell RF (1967). Chronometric analysis of classification. *Psychological Review*, 74, 392-409.

Premack D (1971a). Language in chimpanzee? *Science*, 172, 808-822.

Premack D (1971b). On the assessment of language competence in the chimpanzee. En AM Schrier & F Stollnitz (Red.), *Behavior of nonhuman primates* (pp. 185-228). New York: Academic Press.

Sapir E (1929). The status of linguistics as a science. *Language*, 5, 207-214. [En Edward Sapir: *Culture, language and personality. Selected essays* edited by DG Mandelbaum (pp. 65-77). Berkeley, CA: University of California Press, 1949.]

Saussure F de (1916). *Cours de linguistique générale*. Paris: Payothèque

Searle JR (1995). *Mind: A brief introduction*. Oxford: Oxford University Press

Searle JR (2004). *The construction of social reality*. New York: Free Press.

Spelke ES (1985). Preferential looking methods as tools for the study of cognition in infancy. En G Gottlieb & N Krasnegor (Red.), *Measurement of audition and vision in the first year of postnatal life*. Norwood, NJ: Ablex.

Steinberg DD (1993). *An introduction to psycholinguistics*. Essex: Longman.

Suzuki T (1973). *Kotoba to bunka [Lingvo kaj kulturo]*. Tokio: Iwanami Shoten.

Whorf BL (1956). *Language, thought, and reality: Selected writings of Benjamin Lee Whorf*, edited by Carroll JB. Cambridge, MA: MIT Press.

Winawer J, Witthoft N, Frank MC, Wu L, Wada AR & Boroditsky L (2007). Russian blues reveal effects of language on color discrimination. *Proceedings of National Academy of Sciences*, 104, 7780-7785.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Hiroshi NAGATA

Department of Clinical Psychology

Kawasaki University of Medical Welfare

288 Matsushima

Kurashiki 701-0193

JAPANIO

<hinagata@mw.kawasaki-m.ac.jp>

Priaŭtoro informo

La aŭtoro estas profesoro pri psikologio kaj speciale studas psikolingvistikon rilate al lingvoscio kaj ties akirado fare de denaskaj parolantoj

Rikardo Ŝulco: humoristo?!

Franz-Georg RÖSSLER

Enkonduko

Oni invitis min kontribui per prelego al la OSIEK-konferenco pri "Humuro en la Esperanta literaturo" en 2009 en *Kondoros* (HU), eble per la eksterema temo "Rikardo Ŝulco". Ĉar mi tamen ne volis devojiĝi de la konferenclinio, mi komencis trarigardi la verkojn de la lingvisto, tradukisto kaj poeto el la vidpunkto de la humuro. Kaj, kiel mi jam antaŭe iam kaj tiam konstatis, ankaŭ tiu ĉi kampo ĉe li estas fekunda.

Richard Schulz / Rikardo Ŝulco (*1906 en Hamburgo, †1997 en Mindeno), estis grava Germana⁽¹⁾ Esperantisto, kiu en sia persono kunligis klaran pensadon kun poezia kapablo. Lia granda Esperantlingva verkaro ampleksas lingvosciencajn verkojn same kiel poezion originalan kaj tradukan. Furoris lia lernolibro "*Mein geliebtes Esperanto / Mia amata Esperanto*", kiu pli vere estis profunda kulturlibro pri la Lingvo internacia de d-ro Esperanto. Pri la verkisto okazis en 2007 memorkonferenco de ISAE en la Tavoleta Esperanto-Kasteleto (Italujo) kaj aperis kajero de *Scienca Revuo* (Vol. 59, 2009, n-ro 215, SR 4/2008) pri ĝi.

Tiam oni ne aparte demandis, ĉu Rikardo Ŝulco estis humoristo. Oni ja kredas koni la bildon de la afabla, sed senindulga defendanto de la logikeco de Esperanto. Ŝulco, la Germana "*Oberlehrer* / supera instruisto", kiu per decida fingromontro intencis forviŝi ĉi-un leĝeran makulon el la centjara malpuriĝo de la pure racia Internacia lingvo kaj tial ofte provokis rezistojn, mokojn, kalumniojn. Kaj tiu ĉi bildo ne estas malice mispentrita de malamikoj liaj. Ĝin pravigas la verkolisto de liaj lingvosciencaj tekstoj, kaj ĝin pravigas lia plendo: "Mi ja propre estas poeto, sed mi devas agi tiel por la pluvivo de Esperanto, eĉ se tio rabas de mi mian propran destinon".

En tiu lukto ne estis multa loko kaj tempo por literaturaj ŝercoj, konsiderante ankaŭ, ke liaj Esperantaj jardekoj estis la maljunulaj ĝis alta aĝo. La Ŝulca gajemo precipe montriĝis en liaj frua kaj meza fazoj, kiam li verkis en la Germana lingvo, en la Franca, en la Hispana kaj aliaj, kiam li, sen Esperanto, simple – vivis.

Kaj tiun aspekton la majorio⁽²⁾ de la Esperantistoj ne konas. Sed Ŝulco, provante gardi sian vivoverkon iel en libroj, ankaŭ fruajn temojn kaj tekstojn enmetis en Esperanta kostumo en malfrue eldonitajn librojn. Sed ankaŭ en siaj maljunulaj jardekoj, kiam li vivis pli cerban vivon, li ne neglektis la humuron.

Estis plezuro por aliuloj travivi apud li tiajn momentojn. Rikardo Ŝulco fakte ne estis, laŭ vortoj de prof. *Rüdiger Sachs* (tamen celitaj nur ironie): "timiga rigidmensa maljuna viro". Kaj pri Ŝulca membiografio prof. *Sachs* komentas: "Homo, kiu tiel skribas, estas juna kaj ne fariĝas aĝa. Ho, kiom junaj liaj okuloj brilis dum la rakontado pri tiamaj tempoj!"

Ŝulco havis multajn flankojn. Li povis esti severa instruisto, fervora puristo, rigora analizanto. Sed li ankaŭ konis sin mem, siajn virtojn kaj malvirtojn. Tiel li ankaŭ konis la homojn. Kaj kiel li povis ridi pri si mem, tiel li indulgis humure ankaŭ sian ĉirkaŭaron.

La humuro kaj la teniĝo de Rikardo Ŝulco pri ĝi


Kio estas humura en la verko de Rikardo Ŝulco? La tema gamo ja estas vastega. Ĝi etendiĝas inter senkulpa beba rideto kaj satana ridaĉo kun multaj interaj fazoj. Por iom limigi la kernon de la Ŝulca humuro, ni jam tie ĉi difinu, kia esence ĝi estas:

Ĝi ne rilatas al tiu Fongojta⁽³⁾ verso, en kiu la homoj "*treiben mit Entsetzen Scherz* / per hororo ŝercumadas". Kaj ĝi ne estas, por kontrastigi ĝin al alia antipodo, tiu tipe sudGermana Bavara humuro ekzemple, kiu esprimas sin en bierovaporaj drinkotendoj per manoklaka kaj femurofrapa gestumado, akompanata de sovaĝa ĝojohurlado, muĝanta kriaĉado kaj krudaj diraĵoj.

La Ŝulca humuro estas tipe Hansa, Hamburga, nordGermana. Ĝin karakterizas – almenaŭ en la decaj personoj – noblecon, retenigemon, moderon kaj sinceron.

Tamen li ankaŭ ŝatis, por plenplene kompleta vivo, "*Wein, Weib und Gesang* / Vinon, virinon kaj kantadon", por citi faman valson el laproduktejo de la Viena familio *Strauß*. Nur rilate la vinon li moderigis sin mem laŭ Omaro Kajamo: "Kompreni mi ne povas / ke estas vintrinkado / de la feliĉ' sezamo."

Jam tiuekzemple ni vidas, ke verkiste li restis en la limoj de la dececo, ju pli aĝa, des pli konscie. Kiel ni fine kvalifiku lin? Eĉ tie, kie li disŝprucis ironie sian galon al malamikaj malkomprene-muloj, li restis afabla, nobla Hamburgano. Liaj originalaj kaj truditaj ŝercoj kaj humuraĵoj ĉiam aspektas dignaj, edifaj, serenaj.



ŜULCO Rikardo: Memkarikatur

Tia li estis, homo ne de la scenejo, de la kabaredo, de la televido, sed homo de la litero, de la literaturo, de la lingvoj, kaj homo plena je kompleza, memdona homamo. Ankaŭ humure Rikardo Ŝulco restis Zamenhofeca homarano.

Li mem estis konscia pri sia teniĝo⁽⁴⁾ al la humuro. En "La viro en la luno / Aŭtoro kaj kara leganto", Ŝulco komprenas la humuron konsolo en la malespera situacio de la homaro: "Homaro kaj humuro, unu kondiĉu la alian, por ke la vivo estu tolerebla". Kaj pri la propraj komentoj al "Til' Strigospegul'" li atentigas, ke "ili precipe ankaŭ, kelkafoje kun aparta humuro, iel amuze akcentas la respektivan historion".

La lokoj de la humuraj tekstoj

Ŝulco skribis multege, postlasis ĉ. 3000 paĝojn. La Esperanta verkaĵo, ĉio eldonita, ampleksas 20 librojn, 15 broŝurojn kaj 96 minimume kvarpaĝajn lingvaj/literaturajn informilojn ("Vestfalujaj flugfolioj"). EksterEsperante liaj pensoj kolektiĝas en pluraj manuskriptaj volumoj, zorge binditaj, kaj en malmultaj broŝuroj. Pri tiu parto de lia verko mi havas nur supraĵan konon. Versajne ĝi dispeciĝis kaj, krom kelkaj transprenoj en Esperantaj eldonoj, bedaŭrindege malaperis. Do, kie en la abunda verkaro troviĝas spuroj de la Ŝulca humureco?

Unue ni konstatu, kie preskaŭ aŭ tute ne troviĝas humuraj pecoj:

1. Memkompreneble en la prilingvaj, instruaj kaj informaj libroj kaj broŝuroj la aŭtoro restas serioza. En "*Mein geliebtes Esperanto / Mia amata Esperanto*", en "Pledo por unueca lingvo" aŭ en "*Europäische Hochsprache oder Sprachimperialismus*" ne valoras aparte serĉi. Lian lastan libron "Ĉirkaŭ la skolo Analiza", eldonatan en lia lasta vivojaro, dominas resuma, objektiva tono.

2. En poeziaj kaj tradukaj libroj kiaj "Abismo" kaj "Vespero jam fariĝis" la humuro aperas, se entute, tre fajne kaj por speciala gusto.

En la legolibro "La viro en la luno" Ŝulco tradukis aŭtorojn ne tre humuremajn: Breĥto Berto, Celano Paŭlo, Fonklajsto Henriko, Kafko Franco, Kantio Emanuelo, Ŝniclo Arturo, ktp. Sed almenaŭ la titolrakonto transformas la tekston pri la surLune punata lignoportisto en humuraĵon, kaj ankaŭ dua lia kontribuo estas humurplena. En ĝi li fantazias renkontiĝon kun la satiristo Kiŝo Efraimo, kreante ridigan satiron en la stilo de la Israelano. Ĝi elstaras el inter liaj malmultaj originalaj prozaj humuraĵoj.

Apud tiu ekzistas pluraj kompletaj verkoj kun evidentaj humuraj trajtoj, kaj originalaj kaj tradukitaj.

1. Inter la tradukaĵoj elstaras: "Til' Strigospegul'", "Palmŝtrojmo", "Pendumilaj lidoj", "Per mirigaj aventuroj piprita-vojaĝo Rusujon de la barono Fonmunkhaŭzo".

2. Originaloj, foje tradukitaj el la propra Germana, troviĝas en: "Vestfalujaj flugfolioj", "'*ne ältere Dame aus Preetz / Dameto maljuna el Prec*'", "*Aus des Kopffüßlers Reich / El la kappiedula regno*" (kun propraj humuraj desegnaĵoj), "La muzino".

3. Propraj humuraj biografioj en libroj, se tio konvenis al la ĝenerala trajto.

Aparta verkoflanko kun multaloka ŝercemo estas la Ŝulcaj limerikoj. En "*ne ältere Dame aus Preetz*" li amasigis 333 da ili!

Ĉar Ŝulco ĉiam ŝatis ludojn kun lingvoj, li eĉ en tiu ĉi Germanlingva libro ne restis nur ĉe la gepatra lingvo. Kelkaj versoj verkigis plene en la Angla, la Esperanta kaj la Franca, pluraj uzas dialektojn, eĉ la Svisan, citas la Latinan, multaj surprizas per miksadoj, kie fremdaj lingvoj neatendite interrimiĝas, ekzemple "*chose / Rose*" aŭ "*Brighton / Weiden*".

Pri si mem Ŝulco tie versis unufoje, montrante sian memironion – jam sufiĉa pruvo por humuremo:

Limeriko n-ro 189.

*Da tut sich ein Dichter in Minden
beim Schmieden von Versen sehr schinden.
Doch verträumt ohne Grenzen,
träumt er, wie mit Kränzen
die Leute die Stirn ihm umwinden.*

Jen iel Esperantlingve:

Poeto laboras Mindene
Forĝante poemojn tre pene.
Kaj li revas senlime
Kaj esperas intime
Ke ĉiuj lin laŭru konvene.

Pri aliaj libroj ni tie ĉi nur menciu, ke en "Pendumilaj lidoj" kaj "Palmŝtrojmo" Ŝulco ne povis rekte traduki la tre specifajn Germanajn lingvoludojn, sed inventis lertege konvenajn proprajn adaptojn, eĉ kun Esperanta etoso, brile kaj kun kaŝita memkontento klarigante la trukojn. Kaj nur estu dirate, ke li ankaŭ faris desegnajjn ŝercojn.

Resumo

Ĉu Rikardo Ŝulco estis humoristo? Ne, fakte tia “-isto“ li ne estis. Sed li disponis pri natura doto de humuro, kiun li abunde vivis kaj nemalofte transformis en literaturon. Lia humuro ne estis laŭta, tujan ridon provokanta, ne profesie glata, ne komerca, ne troiga, ne maldeca, ne truda. Tiel, kiel li "memdone" aŭ "afable" salutis fine de siaj leteroj, tiel li plezurigis en siaj libroj la legantojn per pensinstiga ironio aŭ ridetiga humuro.

Foje li ja devis esprimi sin akre. Plej ofte li tamen estis kompleza kaj propramaniere humurece milda. Lia intime bonhumora karaktero ebligis al li transvivi ankaŭ siajn Esperantajn jardekojn. Li eble povas montri al la leganto, kiel oni povas lukti por inda afero kaj tamen per la humuro gardi la internan trankvilecon. Sed por tio oni devas almenaŭ trasperti liajn librojn. Kaj ili nuntempe estas raraj en libroservoj, kaj la seriozaj kaj la humoraj.

Notoj

(1). Laŭ Zamenhofo, la leksoj kaj semantemoj prefere restu sensanĝaj. Sekve mi skribas majuskle ankaŭ la derivitajn verbojn, adjektivojn kaj adverbojn, same kiel la kunmetaĵojn.

(2). Mi prefere uzas la Ŝulcan neologismon “majorio“ laŭ la Fundamenta Regulo 15: angle *majority*, france *majorité*, hispane *mayoría*, itala *maggioranza*, portugale *maioria*, ĉar “plimulto“ aŭ “plejmulto“ estas malĝusta kunmetaĵo: mankas la per “pli“ aŭ “plej“ difinita adjektivo kaj estas fuŝtraduko de la germana vorto *Mehrzahl*.

(3). Diras L.L. Zamenhofo: “La fina formo por la skribado de nomoj estas sendube la ortografio fonetika“, (vd. la libron de R. Ŝulco & H. Bermano: “Leksara kolekto de ofte uzataj propraj nomoj“, Esperanto-Centro Paderborn, 1989).

(4). teniĝo: anstataŭ “sinteno“, apartenanta al la fuŝe formitaj “sin“-kunmetaĵoj. (Kunmetaĵoj formiĝu laŭ Zamenhofo per simpla apudmeto de puraj vortoj).

Adreso de la aŭtoro

RÖSSLER Franz-Georg

Am Münchsbusch 6

DE – 67373 Dudenhofen / GERMANUJO

<roszas@web.de>

Priaŭtoro informo

Li naskiĝis en 1949 en *Ruppertsberg*/Germanujo, estas gimnazia instruisto pri muziko kaj geografio, komponisto.

Ĉu Turkoj povas lerni Esperanton?

– La rusa adjektivo laŭ turka vidpunkto –

Gerald TUCKER

La laŭsistema adjektivo en la rusa lingvo akordas laŭ genro, nombro kaj kazo kun la substantivo. La paradigmoj de la atributo estas plejparte tre regulaj sed ankaŭ ampleksaj. La sistemo kvazaŭ kolapsas ĉe la predikativo.

La rusa lingvo havas sep gramatikajn kazojn (escepte eĉ ok), de kiuj ses ludas rolon ĉe la adjektivo. La vira genro, ina genro kaj neŭtro havas po paradigmon. La plurala paradigmo estas por ĉiuj tri genroj komuna.

La bazaj paradigmoj estas demonstreblaj per la rusa adjektivo **новый** [‘novij] = “nova”:

kazo	vira genro	neŭtro	ina genro	finajoj
nominativo	новый клуб [‘novij klup]	новое письмо [‘novaji piŝj’mo]	новая книга [‘novaja ‘knjiga]	3
genitivo*	нового клуба [‘novava ‘kluba]	нового письма [‘novava piŝj’ma]	новой книги [‘novəj ‘knjigi]	2
dativo	новому клубу [‘novamu ‘klubu]	новому письму [‘novamu piŝj’mu]	новой книгой [‘novəj ‘knjigəj]	2
akuzativo	новый клуб [‘novij klup]	новое письмо [‘novaji piŝj’mo]	новую книгу [‘novuju ‘knjigu]	3
instrumentalo	новым клубом [‘novim ‘klubam]	новым письмом [‘novim piŝj’mom]	новой книгой [‘novəj ‘knjigəj]	2
prepozicia	о новом клубе [a ‘novam ‘klubje]	о новом письме [a ‘novam piŝj’mje]	о новой книге [‘novəj ‘knjigje]	2

* En la finaĵoj –oro kaj –ero la r prononciĝas [v], preskaŭ [ŭ].